nia voĉo

madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2018

## INTENSA KURSO DE ESPERANTO EN JULIO

Madrida Esperanto-Liceo organizas tre intensan kurson de Esperanto dum la monato julio. Ĝi okazos inter la 2-a kaj 20-a de julio, dum la lundoj, mardoj, ĵaŭdoj kaj vendredoj, tio estas la tagoj 2, 3, 5, 6, 9, 10, 12, 13, 16, 17, 19, 20 de julio. Oni planas okazigi ĝin matene kaj vespere, do inter la 10 kaj 14 horoj matene kaj inter 17 kaj 21 vespere, tiel ke la suma nombro da horoj estus 96. Tamen, por tiuj lernantoj kiuj laboras matene, oni kalkulas je la ebleco ĉeesti la kurson dum la vespero (la metodo tion ebligas).

Pri la kurso zorgos Dennis Keefe, instruisto de Esperanto en Hispanio, Francio, Germanio, Hindio, Japanio, Ĉinio kaj Sudkoreo. Interesatoj kontaktu rekte lin ĉe la retadreso keefeinchina@gmail.com, por precizigi detalojn kaj aliĝi.

Oni celas homojn kiuj konas iom Esperanton, ekz. per retaj kursoj kia Duolingo, sed kiuj ne flue parolas ĝin. Temas pri bona kurso por ekparoli kaj legi la lingvon Esperanton atingante altajn nivelojn. Oni uzos la sistemon de la BEK-Kurso, disvolvita de la instruisto.

La loko estos la sidejo de MEL. La kosto estos nur tiu de la fotokopioj de la kurso.

Unu grava atentigo: la instruisto, kiu nun loĝas en la urbo Cullera (apud la marbordo de Valencio), serĉas nun loĝejon en Madrido kaj pretas interŝanĝi sian domon kun homo deziranta somerumi en tiu urbo (la apartamento situas proksime al la plaĝo). Do, se vi havas konaton kiu serĉas someruman lokon apud marbordo, bv. rapide kontakti kun Dennis en la supre indikita adreso.

## RENKONTIĜO POR LERNANTOJ EN RETIRO



Kiel ni anoncis en la pasinta bulteno, Madrida Esperanto-Liceo organizis kunvenon de lernantoj de Esperanto, por praktiki la lingvon kaj koni aliajn parolantojn. Ĝi okazis la pasintan 24-an de junio de la 11a ĝis la 14a horoj matene, en la parko Retiro. Entute partoprenis ĉ. 18 homoj.

Oni profitis por tio la novan ilon de kreado de ĉeestaj renkontiĝoj kaj eventoj de la reta aplikaĵo por lingvolernado Duolingo. Ĝi estis la unua okazaĵo de la t.n. kapitulo Madrido-Esperanto, ene de Duolingo, kaj ripetiĝos en aliaj monatoj. La renkontoj tamen ne estis limigitaj nur por uzantoj de tiu retejo, sed ankaŭ por uzantoj de aliaj lerniloj, partoprenantoj en kursoj aŭ memlernantoj. Fakte en tiu ĉi unua evento alvenis malmultaj homoj pere de Duolingo, sed ankaŭ ĉeestis homoj kiuj sciis per aliaj metodoj, aŭ lernantoj de la ĉeestaj kursoj en Madrido kaj Fuenlabrado.

## FINIĜAS DUA ALIĜPERIODO DE LA ESPERANTO-RENKONTOJ DE MADRIDO

La 30an de junio finiĝas la dua aliĝperiodo por la 77a Hispana Kongreso kaj la 51-a kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiuj disvolviĝos depost la 20a de julio en Madrido. Eblos aliĝi eĉ surloke, sed se vi planas aliĝi, vi povas fari tuj, kaj vi ŝparos parton de la kotizo. Krome, bonas aliĝi antaŭe por faciligi la planadon al la organizantoj.

Ankaŭ finiĝas baldaŭ la periodo por mendi servojn de la kongreso (loĝadon, manĝojn, ekskursojn, ktp). Post tiu dato la organizantoj provos kontentigi la mendojn, sed oni ne povos certigi tion kaze ke elĉerpiĝus la lokoj por tio.

La kulturan kaj distran programon de la Hispana Kongreso eblas legi en la retejo de la kongreso, en la adreso: http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/337.



Ni ĝuos multajn klerigajn kaj kulturajn programerojn, kun prelegoj pri plej diversaj temoj, ne nur pri la baza titolo: "La kultura heredaĵo de Esperanto". Sed ne mankos distraj programeroj.

Koncerne muzikon, oni ĝuos koncertojn de la esperantistaj grupoj "Kaj Tiel Plu" kaj "Kajto". Por la "Nacia Vespero", ni ĝuos koncerton de Muzikistoj de la plektr-orkestro "Calle del Barquillo" kaj Flamenko de l' Kvartalo.

En la turisma parto, interesiĝantoj vizitos la urbojn Alcalá de Henares (dimanĉe), Toledo kaj Segovio. Madridaj ekskursoj estos tre diversaj kaj okazos samtempe kun aliaj programeroj, kaj ripetiĝos en diversaj tagoj.

Okazos malferma programo, por neesperantistoj, ĉefe kursoj de Esperanto (en diversaj niveloj) kaj ankaŭ Lingva Festivalo, kun prezento kaj kursetoj de eble trideko da lingvoj, dimanĉe vespere.

Vidu pliajn detalojn, kun aliĝilo kaj mendilo por servoj de la Kongresoj, listo de aliĝintoj kaj ĉiuj detaloj en la adreso: http://www.esperanto.es/kongreso/

## VIZITIS NIN

La konata esperantista astronomo David Galadí Enríquez prezentis la novan eldonon de lia libro pri astronomio (hispane) "A ras de cielo" en la Planetario de Madrido, la 14an de junio. Ĉeestis kelkaj esperantistoj, kaj li denove klarigis (kiel li jam iam faris en Hispana Kongreso de Alcalá) kial, bedaŭrinde, en la naturo ne ekzistas verdaj steloj.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

Sabaton 7-an de julio, okazos la monata babilrondo en la kafejo de la Kulturdomo "Medialab Prado", strato Alameda 15, enirejo vid-al-vide de la Kulturcentro "La Caixa", je la sesa horo.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com